# RECIM info

Bulteno de *Registrolibro de la Civitanoj de la Mondo*, numero 1, aýgusto 2004, **2 €**

Ni havas la plezuron finfine prezenti al vi tiun novan bultenon de Registrolibro de la Civitanoj de la Mondo. Manke de rimedoj, manke de volontuloj ni restis dum kvar plenaj jaroj sen povi disdoni niajn informojn, kvankam æi tiuj abundas. vi akiros ekvidon pri tio per la legado de la artikoloj de tiu unua RECIM-info.

### RECIM-info : kial tiu nomo ?

RE.CI.M, kiel *REgistrolibro de la CIvitanoj de la Mondo* aý REgistre des CItoyens du Monde, aý REgistro de los CIudadanos del Mundo, aý REgistro del CIttadini del Mondo, aý REgistro dos **CI**dadãos do **M**undo, do akronimo valida por preskaý æiuj latinidaj lingvoj, el kiuj nia þatelekta internacia lingvo Esperanto.

RECIM estas facile memorebla, kaj por la bulteno RECIM-info, kaj por atingi la Interretajn informojn : http://www.recim.org.

RECIM-info estos sesmonata bulteno, kiu eldoniøos en julio-aýgusto kaj en januaro-februaro. Kun modesta prezento : 8 nigrablankaj paøoj, sen granda grafikeco, øi fariøos interkomunikilo, kiun ni deziras disdoni en kiel eble plej multaj lingvoj, laý la aliøontaj tradukistoj. Tiu numero estas samtempe eldonita en Esperanto, franca, angla, hispana kaj nederlanda.

### La kosto :

Kompreneble æiu eldonaĵo havas koston. Komponado, presado, kovertoj, transportaj kaj poþtaj elspezoj, æio entute laýkalkule atingos 1,15 Eýron por unu bulteno. Se oni multobligas tiun koston per la nombro de Civitanoj de la Mondo supoze ricevontaj la bultenon, tio konsistigas gravan þarøon, kiu necesigas æies partoprenon se oni volas daýrigi tiun informservon. Do ni alvokos vin por kontribuado. Cetere tiujn kontribuaĵojn ni bezonos por certa nombro da programoj kaj projektoj, kiujn furmezure vi malkovros.

### Øisdatigo de la listoj

Ni diskonigos al vi la novajn projektojn de Registrolibro de la Mondcivitanoj, de la Kongreso de la Popoloj kaj de la organizaĵoj, kiuj estas asociitaj kun øi. La unua funkcio de Registrolibro de la Mondcivitanoj estas la øisdatigo de la listoj de voædonantoj al la Kongreso de la Popoloj. Jen efiko dezirata per la lanæo de tiu bulteno : la øisdatigo de la tutmondaj balotelektaj listoj por la organizado de la estontaj balotelektoj.

Mi deziras al vi bonan legadon de tiu RECIM-info n-ro 1, kaj atendas viajn reagojn.

*Daniel Durand*
*Prezidanto de Registrolibro de la Mondcivitanoj*
*Eldonestro*

## HISTORIO DE SILENTO

Kvarjara silento. Kial tiom da tempo pasis sen informado ?

Estas multaj specoj da silentoj. Estas tiuj vakuaj silentoj, kiujn naturo abomenas, sed estas silentoj el emocio, silentoj signifoplenaj, silentoj al demandoj kaj silentoj plenaj, portantaj projektojn, kiuj maturiøas ; unuvorte silento estas alia ol foresto.

### La fino de teamo kaj la anstataýigo.

? 1998 : pro sanaj kialoj la prezidanto Jean Predine rezignas pri sia tasko, kaj samtempe kiel li la tuta teamo da volontuloj, kiuj plenumis la laboron en la lokalo æe bulvardo Vincent Auriol. La nova prezidanto troviøis preskaý sola fronte al giganta tasko. Tamen, bulteno estis eldonita en 1999 sendita kun enketilo por trovi helpon, poste alia bulteno eldoniøis en 2000.

? La respondoj al la enketado estis multnombraj : pli ol 250 homoj reagis aý petante pliajn informojn, aý promesante konkretan aý monan helpon. Kaj ekde tiu helpenketado, nova organizo konstruiøis :

- è la statuto estis reviziita dum eksterordinara Øenerala Asembleo la 28an de oktobro 2000 ;
- è la nombro da korespondantoj kaj da Registrocentroj multiøis de 13 øis 39. La nombro de membroj de Registrolibro multiøis de 28 øis 69. (La membroj de Registrolibro estas la volontuloj kiuj estas rekte koncernataj de la registrado de la novaj Mondcivitanoj). Interreta TTT-ejo konstruiøis. La enregistrado de Mondcivitanoj okazis laý kontentiga fluo.

? 5an de junio 2002 : subita forpaso de Renée Marchand. Mondcivitanino el la plej frua tempo, þi estis la æefa aktivulino de la tuta tutmondisma konstruo : Direktorino de la Franca Registrocentro, vicprezidantino de la Registrolibro de la Mondcivitanoj, Sekretariino de la Kongreso de la Popoloj… Trafis nin vera þoko, kiu metis nin fronte al neatenditaj defioj, kiujn æiujn ni transpasis, sed necesas tion diri, per obstina laboro.

? Fine de septembro 2002 : en Dabo (orienta Francio), laý invito de Registrolibro, Studaj Tagoj estis organizitaj por la enregistradaj responsantoj el Francio, Svisio, Germanio, Luksemburgio. Tiuj tri tagoj kunvenigis dek kvin homojn kaj fariøis

*(Daýrigo sur paøo 2)*

### Enhavo

Historio de Silento ....................................p. 1 et 2
Renée Marchand ...........................................p. 2
Kalonge, Tutmondiĝinta urbo ............................p. 3
Kavumu, lernejo tutmondiĝinta … kaj bruligita......p. 5
Novaĵoj el la Registrocentroj .......................p. 5 et 6
Koalicio por Tutmonda Parlamento .....................p. 7
ASKOP - Mulhuzo 1, 2 kaj 3 oktobro ................p. 8

Estas Civitano de la Mondo, ĉiu homo, kiu rekonas sin membro de la homa komunumo kaj metas la homaran intereson super la apartaj interesoj. La enregistriĝo de Civitano de la Mondo donas al tiu natura identeco ĝian eminente politikan karakteron.

vera deirpunkto de kompleta strategio por veki la Kongreson de la Popoloj kaj nian engaøiøon en la konstruado de monda demokratio. Protokolo de tiuj studaj tagoj estas disponebla en franca kaj angla.

**?** 3an de marto 2003 : renovigo de la butika antauaìo de la lokalo, kiu utilas kiel sidejo en Parizo. Tio estis la rezultato de administra antaýa laboro pli ol unujara, kaj poste necesis iom masoni, farbi, refari la skribaìojn, alkroæi la ekspozicion … Tiu punkto sendube þajnas anekdota en la tie æi prezentata kunteksto, sed tie kuþas bona klarigo pri kelkaj laborsilentoj.

**?** 15an kaj 16an de marto 2003 : La komitato por la Kongreso de la Popoloj, konsistigita en Dabo, kunvenis en Diìono por taksi la farton de la institucio kaj esplori la kondiæojn laý kiuj øi povus denove labori. La komitato, konsistanta el membroj de Registrolibro kaj el pluraj Delegitoj al la Kongreso de la Popoloj pretigis plurajn proponojn kaj publikigis deklaracion pri la minaco de tuja milito en Irako. Plena Kunsido de Kongreso de la Popoloj estis kunvokota por oktobro 2003 en Parizo. Ankaý pri tio estas disponebla protokolo en franca kaj angla.

**?** La 3an de majo 2003 en Parizo. Okaze de kunsido de la Administra Konsilantaro de Registrolibro, estis poste organizita ''Debato pri tutmondista strategio'', kiu difinis nian agadlinion øis nun. Ankaý pri tio ekzistas protokolo en franca, angla kaj en Esperanto.

**?** La 25, 26, kaj 27ajn de oktobro 2003, en Parizo, okazis la Plena Kunsido de la Kongreso de la Popoloj. Estis farita larøa situacia konstato pri mondcivitismo kaj pri la institucioj, kiuj devenas el øi, kaj prezento de pluraj invititaj tutmondistaj organizaìoj. La debatoj estis plej konstruaj kaj, laý historia vidpunkto atingis æefe tiujn rezultojn :

**è** a) kreado de Konsultiøa Asembleo æe la Kongreso de la Popoloj (v. en paøo 8)

**è** b) la reformo de la voædona leøo por la Kongreso de la Popoloj (artikolo aperos en estonta bulteno)

kaj do rezultas nova organigramo.

La kompleta protokolo de tiu kunveno ampleksas 39 paøojn. Disponebla en franca, angla kaj parte en Esperanto.

La starigo de la Konsultiøa Asembleo æe la Kongreso de la Popoloj necesigis du kunvenojn : unu en februaro 2004, kie ni difinis øian enhavon ; la alia en aprilo, kie ni adoptis la Internan Regularon, kaj unuan agadan kalendaron.

Al la tuto oni aldonu centopajn leterojn, milopajn elektronikajn mesaøojn, vojaøojn al Parizo, Lieøo, Æaýdefono, Sidnejo, San-Francisko por renkontoj, kunvenoj, konferencoj, prelegoj.

Nun la tuta laboro estas la faro de vera teamo : Liliane Metz, Øenerala sekretariino de Registrolibro, komisiita pri la anglalingvaj aferoj ; la esperantistino Geneviève Charpentier kaj Jean-Michel richard kiuj deìoras en la pariza sidejo, Bernard Henry kaj Fernando Elena Diaz por la tradukoj en angla kaj en hispana, Georges Krassovsky kaj Henri Cainaud æirkaý Roger Winterhalter, prezidanto de la Kongreso de la Popoloj, kaj ties sekretario Jean-Marc Zan, same kiel Giorgio Silfer, provizora øenerala sekretario de la Konsultiøa Asembleo æe la Kongreso de la Popoloj, kaj multaj aliaj homoj .. ne forgesante la veran plurfakecon de pluraj.

Jen entute la historio de (mediata) SILENTO preta por bruegi, kun via partopreno.

*Daniel Durand*

---

La kunvenaj protokoloj estas æiuj senpage haveblaj per Interreto : http://www.recim.org. aý per elektronika poþto : info@recim.org. Oni povas ekhavi ilin ankaý per poþta letero æe la bultena redaktejo, sed kontraý financa partopreno : monbileto de 5 dolaroj aý 5 eýroj por la kompleta kolekto.

## Renée Marchand



Ni forperdis veran æampioninon. Renée Marchand batalis dum pli ol duonjarcento por la mondcivitanismo subtenante sian edzon en lia laboro dum pli ol 40 jaroj ; þi estis tre laborema, humila, inteligenta, bonkora kaj afabla. Þi ne parolis pri siaj talentoj sed sukcesis konversacii en angla kaj en Esperanto kaj skribi kaj eldoni la dokumentojn de la Mondcivitanoj dum tiu tempo.

Dum la someraj sesioj de la Institucio por Tutmondismaj Studoj, organizitaj de Guy Marchand, kiam li heredis kastelon en sudokcidenta Francio, Renée estis ideala gastigantino.

Þi estis senstreæa, plena je talentoj, foje þoforis por seræi la invititojn en la stacidomo je pli ol 70 km kaj organizante la loøadon por pli ol dekdu Mondcivitanoj anoncitaj aý neatendite alvenantaj. Þia rolo en la sukceso de la sesioj estis nekontestebla kaj æiuj en la organizado tion sciis.

Plie þi okupiøis pri la proviantoj kaj pri la multaj invititoj kun neelæerpebla bona humoro kaj efikeco. Þi ne deziris ekhavi superan rolon sed laýbezone þi povis helpi por solvi æiujn problemojn ligitajn al la bona funkciado de la Mondcivitanoj, politika organizaìo, kiu estis je la pinto de la francaj tutmondistaj movadoj dum la duono de la lasta jarcento. Plejofte þi okupiøis pri la lokalo de la Mondcivitanoj en Parizo, situanta proksime de ilia hejmo, tiel þi povis plene sin dediæi al sia laboro.

Guy kaj Renée estis frutempaj civitanoj de la Mondo kaj ilia laboro por la Registrolibro de la Mondcivitanoj estis vera sindediæo.

Þi estis lia helpantino kaj lia kunlaborantino kaj se foje þi devis bremsi liajn senbridajn entuziamojn, tio estis bonfaro. Sed per siaj personaj aktivecoj þi kompletigis tiujn de Guy kaj tiamaniere alportis plian stimulon al lia agadon.

Renée estis ankaý korligita al la mondfederaciistoj eæ se en Francio la organizaìo neniam estis tiel aktiva kiel la civitanoj de la Mondo. Þi æeestis multajn kongresojn de la mondfederaciistoj kiel en Filadelfio en 1987 kaj en Japanio pli frue.

Dum sia tuta vivo, okupita por subteni Guy kaj la civitanojn de la Mondo, þi ankaý fondis familion el knabo kaj knabino, kaj þi eminentis en sia rolo kiel kastelanino de la Mondcivitana Centro en La Lambertie dum la someraj sesioj de la Institucio por Tutmondismaj Studoj.

Plie, Renée estis la Direktorino de la franca Registrocentro situanta en Parizo, rue Victor Duruy, kie la laboro neniam æesis. eæ kiam antaý dudeko da jaroj atako per bombo far dekstrula frakcio ruinigis la lokalon kaj la dokumentajn stokojn kaj detruis æiujn materialojn, kiuj brulis aý damaøiøis.

Renée laboris øis la fino kaj þia subita kaj neatendita morto estis þoko por la movado. Renée estis þatata pro sia afableco kaj siaj multaj kvalitoj. Þi certe mankos al ni.

*John Roberts, Aýgusto 2002*

# KALONGE

## Longa vojaøo komenciøas per unua paþo.

*''Longa vojaøo komenciøas per unua paþo''*. Tia estis la devizo de la Komunuma Konsilantaro de Kalonge, en Demokrata Respubliko Kongio (eksa Zairio), kunveninta la 11an de aprilo 2001 en eksterordinara sesio sub la prezidanteco de la Komunumestro por la adoptado de la Tutmondiøa Ærto, simbola faro sed kiel multe homama. La baloto sekvis peticion lanæitan de la Tutmondiøa Komitato, kiu rikoltis ne malpli ol 7 500 subskribojn.

Sesdek kvin homoj æeestis, reprezentantaj la religiajn kredojn, la evoluasociojn, la junulojn, la inojn kaj la lernejojn. Tutmondiøa Komitato estis kreita por interþanøi informojn kaj por la komunikado de la teritorio de Kalonge kun aliaj mondaj teritorioj kaj kun la Administra Konsilantaro de Registrolibro de la Mondcivitanoj.

La partoprenantoj esprimis siajn postulojn, unue pri la temoj de kunlaborado kun æiuj komunumoj, urboj, entreprenoj kaj lernejoj jam tutmondiøintaj, pri la plifortigo de la informsistemo pri la tutmondismaj tezoj, kaj pri la solidareco inter Mondcivitanoj, por ke kune ni povu trovi solvojn al tiaj problemoj, kiuj minacas la homaron, kiaj mizero, malsato, analfabeteco.

La jenaj demandoj estis faritaj, kiuj æiuj trovis sian respondon æe ni :

*''Post la tutmondiøo de Kalonge, de kiu dependos nia æefdistrikto'' ?*

La tutmondiøo ne ekzistas por regi la teritoriojn, sed por esprimi la volon de la popoloj, kiuj asertas sian apartenon al la tutmonda komunumo. Tio signifas, tute simple, ke la loøantoj de Kalonge komprenis, ke ili havas kelkajn interesojn kaj zorgojn komunajn kun æiuj homoj kaj popoloj de la mondo. Proklamante Kalonge kiel tutmondan teritorion, øiaj loøantoj nun konsideras sin kiel membroj de la tutmonda komunumo. Ili sin diras pretaj por labori kun la aliaj homoj por æies bonfarto kaj sekureco.

*''Kiam ni aýskultas la radion, ni aýdas dirojn, ke kelkaj landoj aprobas la tutmondiøon kaj ke aliaj malaprobas. Æu vi povas diri pli pri tio ? ''*

Nia klopodo estas tre malsama ol la tutmondiøo, pri kiu temas, kaj kiun ni povas nomi ''sovaøa tutmondiøo de la ekonomio''. La tutmondiøo, kiun ni proponas estas koncepto de la Popoloj de la Mondo.

*''Kiu diferenco estas inter urbigo kaj tutmondiøo ?''*

La urbigo estas la ekfunkciado de tuto da teknikaj, higienaj, administraj, ekonomiaj kaj socialaj decidoj, kiuj devas ebligi harmonian, interrilatan kaj homan disvolviøon de la urboj. Siaflanke la tutmondiøo celas malfermon je monda nivelo, kaj ja tio koncernas nin kaj interesas la tutan mondon.

La avantaøoj kaj øena[illegible]oj de la tutmondiøo estis diskutataj. La æefa konkludo, kiu aperas el tio estas la plifortigo de la interþanøoj kaj la kunlaborado inter æiuj Civitanoj de la Mondo por iri al prioritataj komunaj celoj. La diskutado ebligis profundan analizon prr la nunaj vivkondiæoj de la loøantaro de Kalonge.

Por tio estis decidite la kreado de tutmondiøa Konsilio. Kvar æefaj funkcioj estis komisiitaj al øi : 1. Komunikado : vojkonstruado, flugejo, ktp. 2. Socialo : sano, akvo kaj salubrigo, edukado, junularo kaj familio, sporto kaj liberaj tempoj ; 3. Aranøado de la spaco : Medio kaj turismo, plibonigo de la loøejaro kaj konstruado de loøejoj ; 4. Ekonomio : agrikulturo kaj bredado, energio, komerco kaj metiarto.

La artikoloj de la tutmondiøa æarto estis aprobitaj kun aparte tre grava aldono de kvin artikoloj. La artikolo 5 postulas, ke la Kongia registaro faru elprenojn el la militaraj buøetoj kaj de landa rekonstruado por financi tutmondajn balotelektojn kaj, interne de la lando, projektojn ligitajn al *socialaj kaj publikaj substrukturoj*. La artikolo 6 konfirmas la triopan engaøiøon de la loøantoj de Kalonge je la niveloj tutlanda, regiona kaj fine monda, engaøiøo al kiu la artikolo 7 alvokas *''æiun urbon kaj æiun komunumon de la mondo''* aliøi, pli aparte aliøante al la æarto de la minacitaj urboj kaj komunumoj. La artikolo 31 konfirmas la rajton baloti kaj esti elektita, same kiel æies rajton profiti pri æiuj civilaj kaj politikaj rajtoj. La artikolo 32 finsubstrekas la serion konfirmante unu el la ekonomiaj kaj sociaj rajtoj, nome la rajto je laboro.

*(Daýrigo sur paøo 4)*

La TUTMONDISMO estas la tuto de la ideoj kaj agoj esprimantaj la solidarecon de la globloøantoj kaj celantaj starigi supernaciajn instituciojn kaj leøojn kun federacia stukturo, kiuj estu komunaj al ili, en la respekto de la diverseco de la kulturoj kaj popoloj.

La TUTMONDISMO provas proponi novan politikan organizadon de la homaro implicantan la transdonon de iuj partoj de la naciþtata suvereneco al Monda Federacia Aýtoritato kapabla solvi per decidoj de la plimulto la problemojn, kiuj koncernas la sorton de la homa speco, tiaj, kiaj : malsato, milito, poluado, troloøateco, kaj energio.

La postuloj de la tutmondismo ne povas kontentiøi per la sensankciaj devontigoj de la internaciaj traktatoj aý interkonsentoj.

La deziro de æiuj estis unue sendi tiun mesaøon al la magistratoj de Novjorko kaj Moskvo.

La 15an de julio 2001 estis aprobita la statuto de la asocio ‘’Monda Solidareco - Kune Agadi’’ (MSKA - SMAE : smaegcd@yahoo.fr). La 12an de decembro 2001 sekvis la tutmondista statuto de Kalonge, kies kvindek artikoloj konsistigas grandan paþon en la vekiøo de la konsciencoj kaj al mensostata þanøiøo, gardante en la spirito, ke la sekureco kaj la bonfarto de la loøantaro de Kalonge estas firme ligitaj al la sekureco kaj al la bonfarto de æiuj urboj kaj de æiuj komunumoj en la mondo, minacataj per detruado pro milito.

Ne kontraýdirante tiujn dispoziciojn, la tutmondiøa æarto adoptita de la loøantaro de Kalonge celas progresigi la homan dignon, postulante antaý æio la disdonon de la kulturo de sano kaj de edukado al æiuj por antaýenpuþi justicon, liberecon kaj pacon, kiuj devas stari sur la fundamento de la intelekta kaj morala solidareco de la tuta homaro.

‘’Tiu vojaøo, kiun ni komencas hodiaý, estas tre longa. Tamen necesas pacienco kaj persistemo’’ emfazis Aimé Ruzuba Bisimwa, korespondanto de Registrolibro en Kalonge, membro de la Administra Konsilantaro de Registrolibro kaj iniciatinto de tiu kuraøa homa aventuro.

*Aimé Ruzuba Bisimwa*
*kaj Claudine Fischer,*
*kiu eltiris erojn el la dosiero pri la tutmondiøo de Kalonge*

# KALONGE : la projekto de elektroprovizo de la kvartalo Butwashenge

La 26an de februaro 2004, la Tutmondista Komunumo de Kalonge metis la unuan þtonon por la konstruado de hidroelektra centralo destinita por provizi lumon al la Monda urbo Kalonge. Tiu ceremonio de la meto de la unua þtono simbolas ankaý la konstruadon de la Monda urbo Kalonge, projekto iniciatinta de la Civitanoj de la Mondo de tiu regiono. (La æi-apuda foto estis farita dum la ricevo de la elektroturbino.)

La videobendo de la ceremonio de meto de la unua þtono estas vendata por 50 €. Aæetante øin, vi faras donacon de 40 € à la Tutmondista Komunumo de Kalonge por la projekto de la konstruado de la hidroelektra centralo por la malfovorigitaj loøantaroj de la Monda urbo Kalonge, kiuj konis nur æiaspecajn militojn kaj ruiniøojn.



Per via ago, vi kontribuas en la aæeto de unu aý pluraj konstrumaterialoj kaj de la akiro de necesaj ekipoj por la realigado de tiu projekto kiom multe profitonta al la komunumo.

Eltranæu kaj resendu vian mendilon al

⇒ Solidarité Mondiale - Agir Ensemble " SMAE " Citoyen du Monde,
Butwashenge / Kalonge
République Démocratique du Congo
B.P. : 470 Cyangugu / Rwanda
E-poþto : smaesgcd@yahoo.fr

# MENDILO

resendota al *Solidarité Mondiale - Agir Ensemble* " SMAE " B.P. 470 Cyangugu / Rwanda

q Jes, mi mendas la videobendon de la ceremonio de meto de la unua þtono por la konstruado de la hidroelektra centralo en la Monda urbo Kalonge, en Butwashenge, Demokrata Respubliko Kongio.

Mi pagas la mendon q per æeko kunmetita je la ordono de SMAE . q per alia rimedo :

q Mi notis, ke per mia aæeto, mi donacas 40 € al SMAE por øia celo subteni la projekton de elektroprovizado en la Monda urbo Kalonge.

Mi ricevos mian videobendon je la jena adreso :

S-ino, F-ino, S-ro (personaj kaj familiaj nomoj )…………………………………………………………………………………..…..

Adreso : ………………………………………………………………………………………………………………………………...

(Urbo) …………………………. (lando) …………………………

Naciismo ne estas la plej alta koncepto. La plej alta koncepto estas la tutmonda komunumo. ***Gandhi***.

# LA REGISTROCENTROJ KAJ LA KORESPONDANTOJ

En tiu rubriko vi trovos, numeron post numero, informojn kiuj atingis nin inter la plej signifaj.

*La kompletaj raportoj pri la agadoj de la Registrolibraj Korespondantoj kaj pri la vivo de la Registrocentroj troviøos en nova aparta eldonaĵo ekde oktobro 2004, alia bulteno por la Registrocentroj aý kontraý abono.*

## Franca Registrocentro

Post la forpaso de Renée Marchand teamo kunvenis kaj tuj reprenis la toræon, eæ sukcesinte la heroaĵon produkti la bultenon ''Civitanoj de la Mondo'' sen æeso. La teamon nun regas Joël Luguern helpata de Patrick Allalel. Claude Jousseaume okupiøas pri financoj, helpata de Thierry Toulon. Didier Marchand transprenis la komponadon de la bulteno, kaj kelkaj volontuloj (ankoraý ne sufiæe multnombraj) plenumas deĵorojn en la lokalo.

La franca Registrocentro lanæis novan alvokon por la enregistriøo de Civitanoj de la Mondo. Øi estas la ''Alvoko de la artistoj'', jam subskribita de pli ol 50 artistoj el pluraj landoj. Se ekster Francio vi konas artistojn intereseblajn por aliøi al tiu alvoko, ekrilatu kun Claude Jousseaume.

La Registrocentro aranøis standon dum pluraj manifestacioj : Eýropa Sociala Forumo en novembro 2003, 1a Internacia Salono pri Paciniciatoj, komence de junio 2004.

? Civitanoj de la Mondo, 15 rue Victor Duruy, 75015 PARIS.

## Registrocentro en Kalonge (R.D.Kongio)

Aimé Ruzuba Bisimwa, juna mondcivitano unue plenumis la funkcion de Korespondanto de Registrolibro, poste li arigis æirkaý li teamon, kaj ekde januaro 2002 ekzistas en tiu urbo situanta norde de la provinco Sud-Kivuto Registrocentro regata de Venant Mudinga, Patient Maheshe kaj Leonard Matabaro.

La laboro farita de tiu teamo estas eksterordinara pro la milito, kiu plagas tie de ok jaroj. Oni pritaksu : pli ol 80 enregistroj, tutmondigo de la Infaneta kaj Baza Lernejo de Kavumu (la 1an de aprilo 2001), tutmondigo de la æefdistrikto de Kalonge, loøata de 50.000 homoj, la 11an de aprilo 2001 ; kreado de asocio ''Monda Solidareco - Kune Agadi'', kiu þirmas la Registrocentron, sed ankaý alfabetizajn kursojn, Esperanto-kursojn, la perantejon de Monda Fonduso de Solidareco Kontraý la Malsato. La membroj de tiu teamo troviøas ankaý en aliaj strukturoj por la progreso de la Tutmonda urbo Kalonge : riparado de vojoj, konstruado de flegejo, elektriprovizado nun konstruata, de la kvartalo Butwashenge, fiþbredejo, ktp. (Vidu la artikolon en la antaýaj paøoj). La eksperimento kondukata en Kalonge allogas multajn simpatiantojn, kiuj siavice fariøas perantoj de la asocio en aliaj Sud-Kivutaj lokoj.

? Civitanoj de la Mondo, Butwashenge - Kalonge (Kongio R.D.) leteroj tra B.P. 470, CYANGUGU, Ruando.

## Svis-Romanda Registrocentro

Ekde la komenciøo de la jaro 2002 ekzistas en Romanda Svisio nova Registrocentro animata de Chantal Roulin, Claudine Fischer kaj Rolf Haegler. Laý ideo de Claudine la centro realigis animtendon, kiu jam estis uzata en pluraj lokoj, interalie en Æaýdefono dum la somero 2003, kaj en Strasburgo dum la kontraýnuklea manifestacio en 2002. En marto 2003, la membroj de la Registrocentro partoprenis en la Berna manifestacio kontraý la milito en Irako. Øenerala asembleo en septembro 2003 evidentigis la malfacilaĵojn de agado en lando tia, kia estas Svisio.

? Civitanoj de la Mondo, Case postale, CH 1038 BERCHER.

## Krima brulego en la tutmondiĝinta lernejo de Kavumu (Kongio R.D.)



La Infaneta kaj Baza Lernejo de Kavumu ''EMPK'', tutmondiøinta lernejo kiu partoprenas en la Esperantista reto æar de kelkaj monatoj ni enkondukis Esperantokurson, estis trafita de okazoj : unu el la konstruaĵoj de EMPK estis komplete bruligita de bombo lanæita de rebelantoj (trupo de Laurent Nkunda) en la nokto de la 30a de majo 2004. Tiu konstruaĵo entenis la lernejan direkcion kaj kvar klasæambrojn. Æiuj dokumentoj de la lernejo, la instrumaterialoj kaj lernlibroj, la mebloj komplete cindriøis. Jen foto, en kiu la lernejanoj de EMPK maløoje rigardas la lokon, kie troviøis la brulintan konstruaĵon.

*Aimé Ruzuba Bisimwa*

### Malfermita subskripcio

Se vi deziras subteni la rekonstruadon de tiu lernejo, vi povas sendi vian kontribuaĵon al Registrolibro de la Mondcivitanoj kun la mencio ''EMPK''. Æiuj monsumoj ricevotaj kun tiu mencio estos komplete transdonitaj al la lerneja direkcio. Ni raportos pri tio en la estontaj numeroj de tiu bulteno. *Vidu en paøo 8 pri la pagmanieroj.*

### Senegalio

Landing Niassy, krome Delegito al la Kongreso de la Popoloj, ĵus transformis sian oficon de Registrolibra korespondanto en veran Registrocentron dank'al la helpo de Lamine Camara kaj Aminata Diedhou.

? Civitanoj de la Monde, pa/Landing NIASSY, BP 20336 DAKAR-THIAROYE.

### Registrocentro en Vagaduguo (Burkinio)

Korespondanto ekde decembro 2001, Souleymane Drabo aligis al si la kunlaboradon de Alice Larou kaj Adèle Zoungrana por konsistigi Registrocentron en majo 2004. La Centro þajnas multe interesiøi pri la novaj eblecoj, kiun donas la partopreno en la Konsulta Asembleo æe la Kongreso de la Popoloj.

? Civitanoj de la Monde pa/ CAFES 01 BP 6368, OUAGADOUGOU 01, Burkinio

### Japanio, Kanado, Nederlandujo

Tiuj tri Registrocentroj regule produktas bultenojn :

? World Citizens co/ Masaji IE,
1.2.17 Suzurandai Kitamachi Kita Ku,
JP 651 1111 KOBE Japanio

? World Citizens co/ Dorothea SHEASBY, 688 Green Meadow Crescent, MISSISSAUGA, Ont. Kanado L5A 2V2

? Wereldburgers, co/ Jean VERSTRAETEN,
Vredestr. 65, BE 2540 HOVE Belgio

## Monda Fonduso de Solidareco Kontraŭ la Malsato

Institucio de la Kongreso de la Popoloj, kreita en 1982 laý propono de Mondcivitanoj, Monda Fonduso de Solidareco Kontraý la Malsato laboras en la fina celo de la kreado de Tutmonda Institucio de Solidareco. Monda Fonduso sin prezentas kiel transnacia mutuala asocio en kiu partoprenas 1300 membroj el 33 landoj. Øi subtenas projektojn ligitajn al la prinutra memstareco de siaj membroj.

Ekde la fino de junio 2004, la Øenerala Sekretario estas S-ro Yaovi Kuadjo, cetere direktoro de la Asocio por Antaýenpuþo de la Agrikulturistaj grupoj, en Lomeo (Togolando).

Dum ni verkas tiun bultenon, la membrogrupoj de Monda Fonduso en okcidenta Afriko kunvenas en Øenerala Asembleo en Vagaduguo (Burkinio) Unu el la celoj de tiu Asembleo estas la balotelekto de du mondfondusaj okcidentafrikanoj kiel Regionajn Delegitojn. Ili plenrajte partoprenos en la Administra Konsilantaro.

Attentu ! Verþajne Monda Fonduso þanøos sian nomon. Fakte la nuna nomo estas ofte miskomprenata kaj indikas relative malbone la solidarecan specon, kiun la membroj estas alvokitaj praktiki. Ni reparolos pri tio en estonta RECIM-info.

? Monda Fonduso de Solidareco Kontraý la Malsato, Ruelle Haute, FR 21120 GEMEAUX

http://www.globidar.org

## La Korespondantoj

**Svisio** : Claudius Schauffler, en alemana Svisio, estas mondcivitano el la fruaj tempoj, kiu en 1952 rimarkigis sin en Parizo por postuli, surgrimpinte la soklon de statuo, duan æambron æe Unuiøinta Naciaro, la æambro de la Popoloj. Post emeritiøo Claudius rekomencis agadi kaj konsistigis Mondcivitanan asocion. Ekspozicio en Konstanco (Germanio) ; manifestacio en Berno kontraý la Iraka milito ; akceptiøo en la tutmondinøinta urbo Chelles (Francio) la 16an de aprilo 2004.

? Claudius SCHAUFFLER, Dorfhalde 4, CH 3612, STEFFISBURG, Svisio.

**Ganao.** Karl Kpodo reprezentas la Mondcivitanan Registrolibron en Akro ekde la komenciøo de 2001. Li estigis multajn enregistrojn. Li nun preparas serion da prelegoj pri la mondcivitaneco en kunlaborado kun la loka filio de Alliance France

? Karl KPODO, P.O. Box 6289, ACCRA-NORTH, Ganao

**Togolando.** Korespondanto de Registrolibro en Lomeo ekde aýgusto 2003, François Tete sukcesis enregistri dek kvinon da novaj Mondcivitanoj. Li ekkontaktis la novan Øeneralan Sekretarion de Monda Fonduso de Solidareco Kontraý la Malsato, Yaovi Kuadjo, ankaý mondcivitano.

? François TETE, BP 13260, LOME, Togolando

**Brazilo.** Ursula Grattapaglia estas Korespondantino de Registrolibro en Alta Paraiso, kie þi enregistris kelkajn mondcivitanojn. Ursula estas konata en la tuta mondo æefe en diversaj esperantistaj kaj rotariaj medioj kiel la direktorino de la orfo-lernejo Bona Espero, kaj kiel nelacigebla multfaka agantino por Esperanto, mondcivitaneco, kaj la laboro por Unesko. En majo 2004, þi deĵoris æe stando en la Monda Rotaria Kongreso en Osaka (Japanio)

? Ursula GRATTAPAGLIA, Fazenda Escola "Bona Espero", ALTO PARAISO, GO, Brazilo 73.770-000

**Hindio.** Leo Rebello, kuracisto en Bombajo estas korespondanto de Registrolibro ekde aýgusto 2002. Plie li ĵus estis elektita al la Administra Konsilantaro de Registrolibro. En januaro, li prezidis, en Bombajo, laborkunvenon en la kadro de la 3a Monda Sociala Forumo, dediæitan al la konsistigo de Koalicio por Tutmonda Parlamento.

? Leo REBELLO, 28/552 Samata Nagar Kandivali East , IN 400101 MUMBAI (Bombay) Hindio.

**Aýstralio.** Christopher Hamer estas Korespondanto de Registrolibro en Sidnejo ekde Aýgusto 2001. En decembro 2002 li profitis el la voyaøo de Liliane Metz por aranøi tutmondistan vesperon en la Sidneja Aýstrala Instituto. Li ankaý æeestis kun granda intereso en la laboroj de la Plena Kunveno de Kongreso de la Popoloj en Parizo en oktobro 2003.

? Christopher HAMER, 34 Caravan Head Road,, OYSTER BAY, Aýstralio NSW 2225.

**Esperanto.** Geneviève Charpentier deĵoris æe standoj en la Universalaj Kongresoj de Zagrebo kaj Gotenburgo. Tie þi ankaý faris prelegojn pri mondcivitaneco. En la Gotenburga kongreso æirkaý cent homoj æeestis. Pluraj esperantistaj mondcivitanoj alportis al þi sian helpon.

? Geneviève CHARPENTIER, 32-c rue Jean Perrin, FR 77190 DAMMARIE LES LYS, Francio

# Koalicio por Tutmonda Parlamento

Æijare inter la 16a kaj la 21a de januaro 2004 okazis en Bombajo (Hindio) la kvara Monda Sociala Forumo. La partopreno de la Federaciistoj en MSF havis kiel celon la kreadon de mondaj aliancoj por evoluigi la ideon de Tutmonda Demokratio.

1. La 19an de januaro 2004 estis aranøita de la Eýropa Federaciista Movado laborkunveno, kiu nomiøis ''Al Tutmonda Parlamento'' ''Ni kreu reton por Tutmonda demokratio''. Kvindek homoj el 20 landoj partoprenis en la diskutado''.

2. Alia grava laborkunveno okazis la postan tagon, 20an de januaro, pri la temo : ''aranøi koalicion por tutmonda parlamento''.

Je la legado de la teksto publikigita de la Mondfederaciistoj, kiun Nicola Vallinoto diskomunikis en ''Fedechoses'', Daniel Durand kaj Liliane Metz Krencker dum la lasta kunveno de la Registrolibra Estraro (7an, 8a, kaj 9an de junio 2004) longe diskutis pri la ebleco por Registrolibro kaj la Kongreso de la Popoloj aliøi al la klopodo, kiun volas iniciati la koalicio. La sekvonta kunveno estis planita en San-Francisko krome de konferenco organizita de Lucile Green ''Al demokratiigo de Unuiøinta Naciaro''. Estis do decidite, ke Liliane iros en San-Franciskon por partopreni en ambaý kunvenoj, kie sume 150 homoj estis atenditaj.

Krom kelkaj statutaj aspektoj, la laboroj de la Koalicio kunsidanta en San-Francisko inventariis kaj la eksperimentojn de æiu el la partoprenantaj organiza‰oj, kaj la iniciatendajn agadojn. Notinde, ke la grupo kunvenanta en San-Francisko proponis, ke Esperanto estu laborlingvo por la koalicio. La granda sekvonta rendevuo okazos en Porto-Alegre en la kadro de la kvina Monda Sociala Forumo. Registrolibro de la Mondcivitanoj kaj la Kongreso de la Popoloj estos tie reprezentataj.

Raportoj pri la kunvenoj, tiaj, kiaj Liliane Metz Krencker travivis ilin, estas veraj labordokumentoj. Ili estas disponeblaj en franca aý en angla laý simpla peto farita al la adreso de RECIM-info.

Plie ni atendas la definitivajn protokolojn de ambaý kunvenoj kiuj estos disponeblaj nur en angla.

? Liliane Metz Krencker, 6 rue St-Fridolin, FR 67200 STRASBOURG. Francio

## Seræataj volontuloj !

La laborplano de Registrolibro estas grandega, sed la malforteco de nia monaj rimedoj devigas nin seræi volontulojn pretajn por doni el sia tempo por labori kun ni al la progreso de la mondcivitaneco, de la monda demokratio.

Al niaj bezonoj aldoniøas tiuj de Kongreso de la Popoloj de la Konsulta Asembleo æe la Kongreso de la Popoloj, ne forgesante AMIP (ni skribos pri tio poste) kaj de Monda Fonduso.

Necesas tradukistoj en æiujn lingvojn, pedagogojn, interretuloj, afiþfarantoj, artistoj, organizantoj de prelegoj kaj kunvenoj, vojaøantoj, verkistoj, arkivistoj, ktp…

Æu vi havas tian kompetentecon ? Neniel hezitu eæ unu sekundon, ekrilatu kun ni !

info@recim.org

Alvoko al kontribua‰oj :

La lanæo de tiu bulteno esperigas al ni pli bonajn monajn enspezojn. Mono estas la nervo de milito, laýdire. Nia veto estas tio : atingi la tutmondan demokration. Tio okazos nek per magia‰o nek sen mona helpo. Vidu en paøo 8 kiel sendi al ni viajn kontribua‰ojn.

## Invitu viajn proksimulojn registriĝi kiel Civitanoj de la Mondo

Se vi deziras ricevi vian Mondcivitanan legitimkarton, sendu la æi-suban formulon plenumitan kaj subskribitan kun la monsumo 15 Eýroj (8 por la malriæuloj) al la bultena adreso (v. en p. 8)

*"Konscia pri miaj respondecoj kaj decidinte akiri la rekonon de miaj rajtoj kiel membro de la tutmonda komunumo, mi petas, konservante mian þtatanecon, esti registrita kiel mondcivitano".*

NOMO (per majusklaj presliteroj)............................................................................FRAÝLINA NOMO ................................

PERSONAJ NOMOJ ........................................................ Profesio................................................

Naskiødato .................................................... Naskiøloko............................................................

Loøeja adreso ....................................................................................................................................

Poþta adreso (kesto) ..........................................................................................................................

Poþta kodo ……………URBO, ..................................................Lando : .......................................

Laýeble sendu vian foton por legitimilo

En…………………… la ……………….......................

(subskribo)

# KONSULTA ASEMBLEO ÃE LA KONGRESO DE LA POPOLOJ.

La Konsulta Asembleo ĉe la Kongreso de la Popoloj *(ASKOP)* estis kreita de la Kongreso de la Popoloj dum sia plena kunveno en oktobro 2003.

La Kongreso de la Popoloj estis farinta kiel eble plej ampleksan situacian konstaton de la demokrata tutmondismo, ekde la kreado de Internacia Registrolibro de la Mondcivitanoj en 1949, øis la nomitaj alimondistaj iniciatoj de æi lastaj jaroj. Tio nun fariøis evidenteco kaj neceseco por multaj organizoj kaj pensfluoj : la vivo sur la tero, la biosfera pluvivo estas intime ligitaj al la kapablo de la loøantaroj regi siajn vivojn kaj sian komunan estontecon. Nuntempe banaliøas sin deklari ''mondcivitano'', t.e. meti la homaran intereson super la naciaj interesoj. Kaj æiuj samopinias, ke la ''estonteco de homaro estos demokrata aý ne ekzistos''.

Dekoj kaj dekoj da organiza¼oj vole aý implice konsentas kun tio kaj opinias ke tutmonda demokratio povos trudiøi nur per unuiøo de iliaj fortoj. Tial þajnas oportune, kunvenigi la organiza¼ojn kaj æiujn, kiuj opinias ebla alian mondon en multajn asembleojn por ke æiuj renkontiøu, interþanøu siajn spertojn kaj siajn aspirojn kaj ke ili submetu ilin al la reprezentaj instancoj, por ke je la nivelo, kie staras la problemo la elektitoj diru la juron : rajto de homo, rajto de homaro, rajto de la venontaj generacioj, kaj sendube ankaý la devoj, kiuj rezultas de tiuj rajtoj.

## Mulhuzo, la 1an, 2an kaj 3an de oktobro 2004.

La unua proponata kunveno okazos la 1a, 2a, kaj 3an de oktobro 2004 en Mulhuzo, je iniciato de la Domo de la Mondcivitaneco.

- ? Vendredo 1a de oktobro, 20 h : civitana forumo : la monda civitaneco, espero por morgaý.
- ? Sabato 2a, de 9 h øis 22 h : Monda paco kaj malarmado. Forumo de la senlandaj aý senreprezentaj popoloj. Tutmonda Aýtoritato pri medio.
- ? Dimanæo 3a : funkciado de la Konsulta Asembleo ; informadoj kaj diversaj strategioj ; Koalicio por Tutmonda Parlamento. Fino je 16 h.

Por la preciza programo aý por la partopreno, sin direktu al :

ARSO
Maison de la Citoyenneté mondiale
20 rue Paul Schutzenberger
68 200 MULHOUSE
mcm.arso@wanadoo.fr

La estonta bulteno RECIM-info ree¶os tiun kunvenon. Ni precizigu, ke Esperanto estas la oficiala lingvo de ASKOP, sed ke la regionaj kunvenoj de ASKOP okazas normale en loka aý nacia lingvo.

### E-forumo

La Konsulta Asembleo æe la Kongreso de la Popoloj (ASKOP) projektas la kreadon de civitana forumo per Interreto. Nuntempe, ni traseræas animonton. Kiam venos la momento, sufiæos interrete enskribiøi por partopreni en øi kaj aýdigi sian voæon al la Kongreso de la Popoloj pri la elektitaj temoj. Ankaý pri tio necesas atendi estontan bultenon.


**RECIM-info**
Imprimé par nos soins
Le numéro : **2 €** (envoi compris)
Abonnement pour 5 numéros : **10 €**
Tirage : 4000 exemplaires
**Comité de rédaction** : Daniel Durand, Claudine Fischer, Bernard J. Henry, Liliane Metz Krencker.
Directeur de la Publication : Daniel Durand


**Enregistriĝo, abono, memvolaj kontribua¼oj - aĉetoj**

Pagmanieroj :

- aý per øiro al la UEA-konto : civi-p.
- aý al CITOYENS DU MONDE
  CCP PARIS 2848 94 Y
  *IBAN* : FR 46 30041 00001 0284894Y020 02
  Bank Identifier Code : PSSTFRPPPAR
- Ni akceptas la eýrajn æekojn sur francaj bankoj.
- Por la aliaj landoj, preferendas la internacia poþtmandato, aý la interbanka øiro inkluzivante la æi supran IBAN-kodon
- Ni akceptas la bankajn monbiletojn (konverteblajn aý ne) enþovitajn en koloran aý karbonan parperon, sub koverto ne registrita.


REGISTROLIBRO DE LA MONDCIVITANOJ
asocia sidejo :
66 bd Vincent Auriol, 75013 PARIS

Sekretariejo, (librotenado kaj bulteno …) :
**"Les Nids", FR 49190 ST-AUBIN** (France)

**www.recim.org**